

Nova komisiono de TEJO: Scienca kaj Faka Agado (SFA)

por Esperante sciencumemaj junuloj

Komisiono de TEJO pri Scienca kaj Faka Agado

La komisiono de TEJO pri Scienca kaj Faka Agado (SFA) [2] estas la plej nova komisiono de tiu organizo elpensita de kelkaj aktivuloj, kiuj rimarkis la mankon de okazoj, kiujn havas la junaj esperantistoj por prelegi kaj aŭskulti pri sciencaj aferoj en Esperanto dum renkontiĝoj – kaj ĝenerale uzi Esperanton en la scienca mondo. La ideo kunigi junulojn kaj permesi al ili agi science kaj fake per Esperanto baraktis en la kapo de la aktivuloj kaj finfine dum IJK 2013 kunvenis pluraj personoj, kiuj interesiĝas pri sciencaj temoj por pritrakti la kreadon de la komisiono. La intereso de la kunvenantoj estis tiom granda, ke la ideo estis pretigita rapide kaj poste akceptita de TEJO la 5-an de septembro 2013.

Kelkaj el la vortumitaj celoj [1] de la komisiono estas proksimigi sciencon al la juna esperantistaro publikigi ĉi-temajn artikolojn en nia lingvo kaj ebligi al esperantistoj agi en siaj fak-kampoj pere de Esperanto – por tion fari ni kalkulas kun la netaksebla helpo de revuoj kiel Kontakto kaj Scienca Revuo (SR) kaj ties redaktistoj. Por faciligi tion la komisiono instigis la kreadon de helpilo por verki sciencajn artikolojn kaj kunverkis ĝin kun la Terminologia Esperanto Centro (TEC). Espereble tiu dokumento helpos al personoj kiuj interesiĝas verki sciencajn artikolojn sed ne certas, pri kiu estas la unua paŝo por tion fari. Krome ĝi aparte konsilas, kiel solvi la defiojn kiujn oni povas trovi, kiam oni verkas en Esperanto, ekzemple kion oni devas fari, kiam mankas ĝustaj terminoj sciencaj ktp. [3]. Por daŭre havi dokumenton pri la ekesto de la helpilo, la nuna versio aperas en tiu ĉi eldono de Scienca Revuo.

Malgraŭ la mallonga vivtempo de la komisiono ĝi jam kalkulas kun sukcese realigita evento danke al fruktodona kunlaboro kun la organizantoj de la ĵus pasinta Junulara E-Semajno (Szczawno-Zdrój, Pollando). SFA okazigis altkvalitan prelegsesion pri sciencaj kaj fakaj temoj, en kiu partoprenis 10 prelegantoj, plezuriga kaj neatendita kvanto. La grandan intereson pri la temoj konfirmis ankaŭ la plenplena salono kaj la multaj scivolemaj demandoj.

Post la granda sukceso – kaj kvante kaj kvalite – de la prelegsesio dum JES ekestis ideo organizi similan prelegsesion kadre de la Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST) kaj aliaj junularaj aranĝoj. La prelegsesio okazonta dum IJK jam komenciĝis esti organizita fare de la komisiono kaj ĉefe fare de Juan Sebastian Quintero kaj Nick Woods, du junaj sciencistoj. Kaze de demandoj priteme bonvolu turni vin al la organizantoj ĉe la adreso sfaijk2014@tejo.org. La komisiono ankaŭ pretigis dokumenton por helpi la organizadon de tiaj prelegsesioj kaj tiel faciligi ĝiajn okazigojn dum estontaj kaj diversaj Esperantaj aranĝoj.

La nuna skipo de SFA konsistas el eta sed aktiva grupo de aktivuloj, kiuj estas pretaj antaŭenigi sciencon en la esperanta junulara medio. Novaj aktivuloj, proponoj, ideoj, invitoj, prelegoj kaj helpemo ĉiam estas bonvenaj.

Bibliografio

- [1] Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. *Laborplano de TEJO 2013/2014*. Punkto 13. URL: <http://bit.ly/laborplano2013> (vizitita 2014-29-03).
- [2] Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. *Scienca kaj Faka Agado*. URL: <http://tejo.org/eo/sfa> (vizitita 2014-29-03).
- [3] Komisiono de TEJO: *Scienca kaj Faka Agado. Helpilo por verki sciencajn artikolojn*. URL: <http://tinyurl.com/helpiloSFA> (vizitita 2014-29-03).